

Eŭropa Bulteno

Decembro 2017, Numero 176

KIOM SUKCESA LA JARO 2017?



Fine de la jaro necesas resumi la situacion kaj provi taksi la tendencojn por Esperanto. Malgraŭ la historie negativa evoluo en la mondo en kiu kreskegas politikaj tensioj inter la ĉefaj mondaj potencoj kaj grave kreskas naciisma kaj religia ekstremismo, ŝajnas ke la ĝeneralaj ŝancoj por Esperanto gajnas novajn terenojn. Regreso sentiĝas nur en sferoj kie oni ne kapablas adaptiĝi al nova moderna teknologia evoluo. Pro tio esence granda krizo kaptis la mondan E-organizon UEA, kiu gravege ŝrumpis en la jaro 2017 kaj rilate la nombron de membroj kaj rilate la financan staton. Ne tiom grave, tamen sentiĝas ankaŭ malevoluo en pluraj eŭropaj landoj, aparte en tiuj de eksa socialismo, kie nun la movado ŝrumpis ĝenerale al dekono de tio kio ĝi estis en okdekaj jaroj.

Tamen en la mondo sentiĝas grava progreso en Afriko kaj Azio kun novaj E-asocioj, novaj internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj kaj entuziasmo de junaj esperantistoj, aparte en Afriko kaj kelkaj landoj de Azio (Ĉinio, Vjetnamio...) Malgraŭ maljuniĝo de la membraro kaj malkresko de la nombro en Eŭropo oni povas aserti ke la prosperaj paŝoj estis faritaj je pluraj kampoj.

Antaŭ ĉio gravega estis la kunlaboro inter EEU kaj la Komisionano de Eŭropa Komisiono Vytenis Andriukaitis. Li persone venis al la konferenco de EEU dediĉita al 100 jaroj de la morto de Zamenhof kaj Germana E-kongreso en Freiburg, kie li prezentis tre aktualan subtenan paroladon por Esperanto, kiu poste aperis en Esperanto ankaŭ en lia oficiala blogo de Eŭropa Komisiono. EEU proklamis lin honora membro kaj transdonis la diplomon kaj medalon la 18-an de decembro en Bruselo. Tiukaze li akceptis la delegitaron de EEU kaj havis tre gravan interparolon pri la estonto de Eŭropa Movado (pri tio aparta artikolo en tiu ĉi Bulteno). Tio malfermas perspektivojn en EU sen antaŭvideblaj konsekvencoj. Alia tre grava atingo en EU estis la oficiala subteno de la eŭropa fondaĵo Erasmus+ al projekto de esperantista konsorcio el 9 partneroj de 6 landoj, gvidata de kroata E-eldonejo Izvori "Multlingvisma Akcelilo" per grava financa subteno. Tiu projekto malfermas seriozajn ŝancojn por Esperanto en Eŭropaj lernejoj.

Fine la grandan progreson prezentas antaŭ ĉio la plua evoluo de la reta kurso Duolingo kies anglalingva versio jam atingis 1.150.000 lernantojn dum malpli ol 3 jaroj kaj la hispanlingva versio atingis 270.000 lernantojn dum malpli ol 2 jaroj. Tiuj ciferoj estas eksterordinaraj kompare kun nombro de kursanoj en klasikaj kursoj tra la mondo kiuj entute en la tuta mondo laŭ mia takso ne superas 100.000 gelernantojn. Paralele kun tiuj eksplodaj sukcesoj de duolingo kreskas ankaŭ lernado per aliaj retaj kursoj kiel lernu.net, learn.esperanto.com kiel portaloj kun kelkdeko da lingvaj versioj kaj nacilingvaj retaj kursoj. Ĉirkaŭ duolingo evoluas nova E-movado ĉar la dekmiloj da novaj esperantistoj komencas krei servojn por si kaj aliaj kiel la usona reto de renkontiĝejoj, telefona aplikaĵo Amikumu, ĉiam pli granda kvanto da televidaj blogoj en Esperanto akj kresko de kantgrupoj kaj muzika produktado.

Fine necesas mencii ke ankaŭ la 100-jariĝo de la morto de Zamenhof pro kiu UNESCO proklamis Zamenhofon kune kun centoj da aliaj mondaj gravuloj merita monda personeco, kaŭzis iom pli viglan lokan agadon rilate al prifesto kaj memorigo de tiu dato. Mi ankoraŭ ne scias sed en la sekva monato mi klopodos kolekti datumojn pri efektiva festado de Zamenhofa Jaro.

Sukcesan kaj optimisman aktivadon en 2018 dezioras al ĉiuj legantoj

Zlatko Tišljarić

TOSTO

Antaŭnovjaro sonorila,
foira, eferveska, brila –
insiste memorigas pri la
ŝaŭmvinpokala gaja tint’.
Amikoj, pretas mi kuntoste
La jaron, kiu venas poste,
renkonti ĝoje, en ripoz’ de
plagaro de l’ pasint’.
Varmigu nin la rememoroj
Nur pri feliĉaj niaj horoj,
pri finfaritaj penlaboroj,
pri ĉiu bona far’,
kaj niaj tostoĵ sonu voke
kaj la amikoj ĉiuloke
kun ni ekstostu reciproke
por bona Nova Jar’.



Mikaelo Bronstein

TRANSDONO DE HONORA MEMBRECO DE EEU AL EU-KOMISIONANO VYTENIS ANDRIUKAITIS

Bruselo, la 18-an de decembro 2017

Bona novaĵo! Eŭropa Komisionano pri Sano, doktoro Vytenis Andriukaitis, konsentis veni al la UK en Lisbono kaj fari la ĉefparoladon. La 18an de decembro 2017 delegacio de EEU vizitis V. Andriukaitis en la Berlaymont en Bruselo por prezenti al li diplomon kaj medalon pro la honora membreco de EEU kiun la Komisionano ricevis en Freiburg junio 2017. Krom la prezidanto de EEU, d-ro Seán Ó Riain, venis la vicprezidantino kaj trezoristo de EEU, s-ino Flory Witdoeck el Belgio, kaj ambasadoro Ulrich Brandenburg el Germanio, valora membro de la estraro de EEU. Ni transdonis la inviton de Mark Fettes, prezidanto de UEA, inciitan de la estraro de EEU, al la Komisionano Andriukaitis. Ni menciis al li la solenan inauguron de la UK, dimanĉon, la 29an de julio, kaj li diris ke tiu tago taŭgas por li. Ni klarigis la temon de la UK, „Kulturoj, lingvoj, tutmondigo: kien nun?“.

La komisionano forte substrekas sian simpatian kaj subtenon al Esperanto, kiun li lernis en sovetia malliberejo antaŭ 40 jaroj kiel „protesto kontraŭ la rusigo de Litovio“. Li bone konas la historion de Esperanto kaj de la zamenhofa familio. Li diris ke li plurfoje parolis kun sia komisiona kolego, Tibor Navracsecs, pri Esperanto. Navracsecs, li diris, „ne estas kontraŭ Esperanto, sed ankaŭ ne montris iun ajn entuziasmon pri la lingvo“.

Laŭ bona ideo de Ulrich Brandenburg, ni petis la helpon de V. Andriukaitis organizi kunvenon por ni kun la komisionano Navracsecs, kiu respondecas pri edukado, kulturo kaj lingvoj. Li konsentis helpi nin, kaj eĉ proponis ke ni konsideru ian konferencon, kie ni povos montri Esperanton kiel helpilon kaj akcelilon de la lingvolernado ĝenerale. EEU preparolos la

detalojn de tia konferenco kun Tibor Navracsics kiam ni renkontos lin. Ni priskribis la poliglota kunvenon en Bratislavo pasintjare, kie proksimume triono de la partoprenantoj parolis Esperanton. V. Andriukaitis ne sciis pri tiu konferenco, kaj montris grandan intereson. Li diris ke li parolos pri ĝi kun sia kolego Navracsics, kaj substrekos ke tio estas bona ekzemplo de multlingveco.



EEU daŭrigos la fruktodonan kunlaboron kun la komisionano Andriukaitis. Sume, la kunveno estis tre pozitiva, kaj la Komisionano promesis ĉion fareblan fari por helpi al Esperanto. Jen informcele foto de la transdono de la diplomo kaj la medalo. Mi elkore dankas al Petro Balaž, Slovakio, por la preparo kaj sendo de ambaŭ, kaj al mia edzino, Nathalie Vernick, kiu bele enkadrigis la diplomon.

Seán Ó Riain

DISTINGOJ OKAZE DE ZAMENHOF AJ TAGOJ 14-17.12.2017 EN NOVA SONĈO

Patronoj de „Zamenhofa Tagoj” en Nowy Sącz estis Malgrandpoluja Vojevodo, estro de la Novsonĉa distrikto kaj prezidanto de la urbo Nowy Sącz (Nova Sonĉo). Jubilea Zamenhofa jaro 2017 sub aŭspicioj de UNESCO estis bona okazo por peto de ŝtataj aŭtoritatoj kaj ankaŭ la loka registaro, por ke ili honorigu niajn longe agantaj kaj meritajn esperantistojn per ŝtataj kaj honoraj lokaj distingoj.

Tiel okazis - proponoj de la estraro de CIE estis akceptitaj kaj dum solena inaŭguro de Zamenhofaj Tagoj la 15-an de decembro 2017, aktivuloj de Centro de Internacia Edukado estis distingitaj ricevinte eĉ 10 distingojn - ĉi kaze: 5 ŝtatajn distingojn, kiujn enmanigis al elstaraj aktivuloj, Malgrandpoluja Vojevodo Jozefo Gawron, kiu venis al Nova Sonĉo speciale por tiu ĉi okazintaĵo..

Ŝtatajn Krucojn de la Merito ricevis:

- orajn pormeritajn krucojn: Jolanta Kieres kaj Halina Komar
- arĝentajn pormeritajn krucojn: Eva Tracz kaj Bogdan Dembiec
- bronzan pormeritan krucon: Andreo Sochacki

Krom tio oni distingis per 2 lokaj distingoj de la Estro de Novsonĉa Distrikto „Ora Pomo” – Danuta-n Kowalska kaj Eduardon Meler.

Urba Konsilantaro promociis ankaŭ per 3 „Blazonaj Novsonĉaj Egidoj” membrojn de CIE, motivante tiun ĉi decidon de merito por disvastigado de ideo kaj lingvo de Esperanto inter loka socio kaj promociado de Novsonĉa Tero en Pollando kaj eksterlande. Tiujn ĉi „Blazonojn” ricevis Maria Baran, Halina Komar kaj Alicja Skalska.

Oficialaj gastoj de ĉi tiu solenaĵo ricevis, krom estimo, ankaŭ simpation de esperantista socio. Ili ĉiuj kun vera interesiĝo spektis prezentadon pri temo de Esperanto kaj poste kun vidita plezuro ili aŭskultis koncerton de esperantaj kanzonoj, prezentitan de multgeneraciaj grupoj „E-Familio”, „Steletoj” kaj „Junaj Voĉoj”. Ni sentis nin ege honorigitaj per ilia aŭtentika engaĝigita partopreno en nia solenaĵo.

Halina Komar

ZAMENHOFA TAGO 2017 EN SLOVENIO



Okaze de 130 jaroj de Esperanto, Esperanto-Societo Ljubljana (ESL) kaj Slovenia Esperanto-Ligo (SIEL) kune aranĝis solenaĵon kaj kunsolenaĵon okaze de la 158-a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof kaj al honorigo de la Tago de Esperanto-libro kaj de la Tutmonda tago de homaj rajtoj vendredon, la 15-an de decembro 2017 je la 10-a horo en la salono en la strato Štefanova 11 en Ljubljana.

Dum lastaj jaroj slovenaj geesperantistoj celebras la Zamenhofan tagon ne samtage en

du malsamaj lokoj, tio estas en la orienta kaj okcidenta regiono de la lando. Oni celas, ke la vojo de la partoprenantoj ne estu tro longa kaj samtempe ebligas viziti ambaŭ aranĝojn, kunestadon kaj opiniinterŝanĝon. Tiel la unua aranĝo okazis la 10-an de decembro en Lendava, proksime de la hungara landlimo. La organizantoj estis Esperanto-Societo Maribor (ESM) kaj la Fervojistaj Esperanto-Societo (FES). Partoprenis ankaŭ gastoj el Graz (Aŭstrio).



La solenaĵon en Ljubljana vizitis pli ol dudek geesperantistoj kaj geamikoj de Esperanto. En la unua punkto de la programo la prezidanto de SIEL Janez Zadavec prelegis pri la 80-jara historio de SIEL. Li menciis, ke en la ora periodo 1950 ĝis 1970, SIEL gvidis la jugoslavian esperantan eldonejon kaj havis propran oficejon kaj profesian sekretarion. Unu el elstaraj projektoj estis la internacia Pedagogia Didaktika Eksperimento dum la jaroj 1969 ĝis 1974. Nuntempe oni povas nur sonĝi pri tiu nivelo de aktiveco.

La plenumkomitato de SIEL distingis tri ĵurnalistojn de la radio-televido-stacio RTV Slovenija per rekono por ilia profunda kaj favora raportado pri Esperanto-movado dum la jaro 2017.

Sekvis la prelego de Vinko Ošlak pri historiaj radikoj de la kristana reformacio okaze de la 500-jara jubileo de la 95 tezoj de Martin Luther kaj pri la kunligiteco kun la estiĝo de internaciaj lingvoj, aparte Esperanto. La meditemo de Ošlak apogiĝis sur la kreisma hipotezo kaj Biblio. Kvankam ĉiuj ne konsentis kun la preleganto, li prezentis multajn interesajn vidpunktojn kaj dilemojn.

Reneja Mihelič ĉarme deklamis la poemon de Josip Pupačić *La maro*. Kun tiu ĉi sceno ŝi gajnis la oran premion de la internacia deklamkonkurso en Inter-Fest Bjelovar (Kroatio) en aŭgusto 2017. Janez Jug prezentis gravan projekton de SIEL kaj EDL – la eldonon de la reta Slovena-Esperanta vortaro. La nova plilarĝigita vortaro baziĝas sur la postlasitaj materialoj de la vortaristino Mica Petrič, kiu kompletigis kaj renovigis sian en la jaro 1963 presitan vortaron ĝis la morto en 1985. La reta vortaro en la platformo *Termania* (<http://www.termania.net/>) estos je senpaga dispono de la publiko en printempo 2018. La reta vortaro estos viva organismo kaj povos esti perfektigita dum uzado pere de redaktoroj.

La programon finis la anonco de tri gajaj novaĵoj. La unua estis la eldono de turisma faltfolio de la urbo Slovenj Gradec (Karintia regiono de Slovenio) en Esperanto, kiun preparis la esperantista sekcio ĉe la Kultura Societo Slovenj Gradec (la mentoro Vinko Ošlak). La dua novaĵo estis la apero de la sola romanooriginale skribita en Esperanto, kies agado okazas en Slovenio: *La Sonorilo de Bled* de Stevan Živanović. La romano aperis 20 jarojn post la morto de la aŭtoro en 1938. Nun oni aldonis la slovenan tradukon fare de Milan Jarnovič, sekve la libro estas dulingva. Bonvolu legi pli en <http://esperanto-maribor.si/blejski-zvon/>.

La tria novaĵo estas tre grava por la futuro de SIEL kaj la Esperanto-movado en Slovenio: la slovena registaro pere de la adekvata komisiono de la Kulturministerio aprobis al SIEL la statuson de la organizo en publika intereso, kio signifas ke SIEL rajtas gajni publikan subtenon kaj monon. Klare ke tio ne estas nur avantaĝo, sed ankaŭ granda respondeco.

La renkontiĝon ni daŭrigis per libera diskutado, kuniĝado, manĝetado kaj babilado. Eblis ankaŭ aĉeti esperantan literaturon el la stoko de la Slovenia Esperanto-Ligo kaj pagi la membrokotizojn.

Ostoj Kristan

AGADOJ DE ITALA E-FEDERACIO EN LA ZAMENHOF-JARO



15/12/2016: Palermo, palaco de la Provinca Administrejo: inaŭguro de pentraĵ-ekspozicio dediĉita al Zamenhof ĉeestis la urbestro Leo Luca Orlando

4/03/2017: Palermo inaŭguro de Strato Esperanto, ĉeestas la urbestro Leo Luca Orlando

1/04/2017: Pistoia: jarcento de la forpaso de Zamenhof kaj de la naskiĝo de Umberto Stoppoloni (grava esperantisto, prezidinto de IEF), signo de premio Esperanto por la paco ka premio Stoppoloni, pola ambasadoro aŭspiciis kaj ĉeestis la unua sekretario

14/04/2017: Brescia omaĝo al Zamenhof okaze de la centa datreveno de lia morto, ĉeestis interalie la rektoro de la universitato, la urbestro kaj aliaj aŭtoritatuloj.

Xx/04/2017: Pescara: regiona kunveno memore al Zamenhof

20/4 – 20/5-2017 Treviso: ekspozicio de 60 paneloj faqritaj de la loka grupo en la enirhalo de la urbodomo, inaŭguro en cheesto de la urbestro kaj de Mandirola nome de FEI1

26/04/2017: RAI2 nacia televido intervjuo al Paola Nigrelli, Carlotta Pavese, Michela Lipari

29/04/2017: Morra De Sanctis (urbeto en suda Italio): kunveno pri afrikaj landoj ĉeestis tri afrikaj ambasadoroj, kelkaj ataŝeoj, prelegis Corsetti, Lipari

2/05/2017: Radio1 nacia radio: intervjuo al Ranieri Clerici

8/06/2017: Torino inaŭguro de ĝardeno Zamenhof, ĉeestis la pola konsulo kaj la anstataŭnto de la urbestro kun la oficialaj urbaj stendardoj

15/10/2017: Roma premio de Amnesty International itala sekcio kaj Free Lance International Press

6/11/2017: Roma biblioteko deputita ĉambro: Inaŭguro ekspozicio - polaj paneloj kaj libroj – pri Zamenhof ĉeestis la aferŝarĝito de la Pola Ambassadejo en Italio, Ambasadoro Novello, Ambasadoro de Korea Respubliko ĉe Vatikano, honora Cicchitto, prezidanto de la komisiono por eksterlandaj aferoj de la deputita ĉambro

6/11 – 20/11/2017: Roma ekspozicio ĉe la biblioteko de la deputita ĉambro

21/11/2017. RAI2 ŝtata televido: intervjuo al Debora Rossetti, Paolo Scotti, Michela Lipari

10/12/2017: Radio1 ŝtata radio: intervjuo al Nicola Ruggiero

11/12/2017: Roma Pola Akademio: simpozio kun 10 universitataj profesoroj dediĉita al Zamenhof (laborlingvoj Esperanto kaj itala)

11/12/2017. Roma: Pola kulturinstituto: “Dottor Zamenhof” monologo de Mario Migliucci

16/12/2017: Tolfa. “Esperanto kaj Unesko” ĉe la instituto italo-norvega, ĉeestis la urbestro kaj du skabenoj de la urbeto Tolfa, la direktoro de la biblioteko, ambasadoro Novello, Stanisalo de Marsanich, direktoro Instituto Literaturaj Parkoj, Magdalena Trudzik unua sekretario de la pola ambassadejo, Rakoen Maertens.

Michela Lipari

EN KEBEKIO TIMO PRO DAŬRA MALFORTIĜADO DE LA FRANCA LINGVO

En Kebekio en Kanado la franca estas unua oficiala lingvo kiun konstante uzas 84% de la tiea loĝantaro. Dum la lastaj jaroj daŭre alfluas enmigrantoj el la tuta mondo inter kiuj preskaŭ neniuj konas la francan. La ŝtato pagas kursojn de la franca por ili kaj honorariojn dum la lernado sed tiuj kursoj nun montras egan fiaskon. La kursojn enskribas 28% de la enmigrantoj (do 72% eĉ ne provas lerni ĝin) kaj el inter tiuj 28% malpli ol 10% sukcesas atingi nivelon de la unua grado kiu ebligas daŭrigi la lernadon. Krome ankaŭ la hejma loĝantaro kiu bone regas la francan ĉiam pli iĝas dulingva, do duontempe uzas la anglan.

En Kebekio ekregis la timo ke la franca rapidege perdas le terenon en la tempo de la angla konkerado.

Laŭ la artikolo: <https://www.theglobeandmail.com/opinion/francisation-failure-stokes-language-fears-in-quebec/article37169358/>

Mallongigis Zlatko Tišljarić

PORTU VIAN LUMON KAJ KREDU: POVILAS JEGOROVAS HONORITA



La 14an de decembro en la historia Urbodomo de Vilno okazis solena ceremonio organizita de la Litovia ministerio de kulturo, en kiu la ministro de kulturo Liana Ruokytė-Jonsson enmanigis diversajn premiojn kaj honorigojn de la ministerio al 35 personoj. Inter ili tri personoj ricevis la plej altan distingon de la ministerio – la honorsignon “Nešk savo šviesą ir tikėk” (Portu Vian lumon kaj kredu). Unu el ili estis la prezidanto de la

Litova Esperanto-Asocio (LEA) Povilas Jegorovas, kiu ricevis ĝin “pro grava kontribuo kaj grandaj meritoj al la Litovia kulturo, pro inspiraj iniciatoj por pozitiva agado en la komunumo, pro persona respondeco en kreado de kultura kaj spirita etoso, pro firmigo de kultura dialogo, flegado de nacia konkordo, kreskigo de la humanismaj valoroj en la socio, kaj pro la multjara esperantista agado”.

La ceremonion ĉeestis ankaŭ la vicministro de kulturo Gintautė Žemaitytė. Al la ceremonio estis invititaj pli ol ducent kulturagantoj kaj funkciuloj, inkluzive de la unua vicprezidanto de LEA Audrys Antanaitis, vicprezidanto de LEA Arimantas Račkauskas, respondeca sekretario de LEA Irena Alijošiūtė, prezidanto de la Vilna Esperanto-Societo Algimantas Piliponis kaj ankoraŭ kvin esperantistoj de Vilno. La ceremonion gvidis la konata litova aktoro Gintaras Mikalauskas. Ĉiu honorito fare de la prezidanto de la kunveno estis prezentita per proksimume duonpaĝa teksto, pri Povilas Jegorovas estis notitaj liaj ĉefaj agadoj en la Esperanto-movado.

Komence de la ceremonio Liana Ruokytė-Jonsson gratulis ĉiujn honoritojn, substrekis la gravecon de iliaj kulturaj agadoj kaj ĝojis pro la riĉa kaj diversflanka kultura vivo en Litovio. Ricevinte la honorsignon, Povilas Jegorovas en sia kelkminuta dankparolado emfazis lingvajn problemojn internacie kaj en la lando kaj diris, ke esperantistoj en ĉi tiuj temoj povas diri siajn tre firmajn vortojn. Laŭ la instigo de la prezidanto de la kunveno, li fine diris kelkajn frazojn en Esperanto, bondezirante okaze de la proksimiĝantaj Kristnasko kaj Novjarfesto al ĉiuj, kio ege vigligis la plenan salonon da ĉeestantoj.

Dum paŭzoj en la sufiĉe longa ceremonio tre bele kaj bonhumore kantis la fama junulara koruso “Kivi”. Partoprenis multaj ĵurnalistoj kaj fotistoj. Krom multaj fotoj dum la premiado fine estis farita komuna foto de ĉiuj premiitoj kun la ministro de kulturo. La ceremonion kronis abunda akcepto de la ministro. Pri la evento vaste informis diversaj amaskomunikiloj de Litovio, ankaŭ ĉefa vespera novaĵprogramo de la Litovia nacia televido “Panorama” kaj la retejo de la kulturministerio.

Pri la honorigo decidis speciala naŭpersona ministeria komisiono, en kiu estas tri vicministroj kaj kelkaj aliaj altrangaj funkciuloj de la ministerio. La rekomendon atribui al Povilas Jegorovas la honorsignon "Portu Vian lumon kaj kredu" faris la prezidanto de la parlamenta komitato pri kulturo Ramūnas Karbauskis. Povilas Jegorovas ricevis honorsignon №40. Tio signifas, ke ekde 1990 ĝis nun nur 40 homoj ricevis ĉi tiun altan distingon.

El Ondo de Esperanto

60 JAROJ DE CDELI



Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) dum la semajnfino de la 30-a de septembro al la 1-a de oktobro festis sian sesdekjaran ekziston.

Ni raportis en la starteldono de Svisa Espero (somero 2015/01) en plurpaĝa artikolo detale pri la historio kaj signifo de la centro en la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. La CDELI posedas unu el la plej grandaj kolektoj de la mondo pri planlingvoj kaj Esperanto kaj estas grava konsultiĝejo por interlingvistoj el la tuta mondo. En CDELI troviĝas ankaŭ la sidejo kaj la arkivo de la Svisa Esperanto-Societo.
El Svisa Espero

NOVA KURSO DE UNIVERSITATO EN KRAKOVO

En januaro komenciĝos internacia E-kurso je supera nivelo, en la kategorio de specialaj kursoj. Ĝi estas gvidota de instruistino vive, en Interreto. La lecionoj okazos 1-foje semajne.

Eblas aliĝi ĝis la 4-a de januaro 2018.

Temas pri 5-monata kurso de Esperanto, kiun organizas la Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando. Instruos Maria Majerczak.

La oficialaj konfirmiloj pri la partopreno enhavas krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, la markon de la internacia EAQUALS-kvalito de Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon.

Informoj pri la kurso: goo.gl/x1S3AH

Se, studinte ĉiujn informojn en la indikita retpaĝo (la anonco), vi decidis ALIĜI, bv. skribi al: [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(at\)gmail\(punkto com\)](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(at)gmail(punkto com)).

Maria Majerczak

JARA PROGRAMO DE KULTURDOMO GRESILLON

2018-apr-20/28: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj internaciaj KER-ekzamenoj:

gresillon.org/p

2018-maj-09/13: Korusa renkonto de Interkant' kaj Vegana renkontiĝo:

gresillon.org/koruso

2018-maj-09/13: ReVe, Renkontiĝo Vegana: gresillon.org/reve

2018-jul-09/27: Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj

2018-jul-09/16: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso: gresillon.org/s1


2018-jul-16/21: Turisma semajno kaj Esperanto-kurso: gresillon.org/s2

2018-jul-21/27: Internacia E-Konferenco de OSIEK « Esperanto en Artoj »: gresillon.org/s3

2018-aŭg-11/19: Festa Semajno por infanoj kaj familioj, gresillon.org/s4

Bert Schuman

SLOVENLINGVA TRADUKO EL ORIGINALA ESPERANTO



La dekkvina de decembro estas naskiĝtago de L. L. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. Baze de iniciato de unu el gravaj Esperantaj verkistoj Julio Baghy, ni festas tiun tagon ankaŭ kiel tagon de Esperanta kulturo.

Por levi la spiritan nivelon de esperantistoj Baghy proponis ke la Zamenhofa tago devus esti ankaŭ Tago de esperanta libro. Okaze de kulturaj aranĝoj lokaj e-grupoj devus informadi ne-

esperantistojn pri la internacia lingvo Esperanto, pri ĝia riĉa literaturo en originala verkado kaj tradukita. Ni montru kiel nia Movado disvastigas kulturverkojn el diversaj kulturoj kaj ebligas al homoj de diversaj nacioj ĝui en la verkoj de aliaj popoloj.

Krom la organizado de renkontiĝoj, aranĝoj, prelegoj pri Zamenhof, tiu tago prezentu feston de E-literaturo ankaŭ per aĉeto kaj legado de nova libro.

Tiucele la Maribora E-societo eldonis la solan romanon skribitan en esperanto, kies enhavo okazas en Slovenio: La Sonorilo de Bled de Stevan Živanović. Ni aldonis (de Milan Jarnovič) la slovenan tradukon, sekve la libro estas dulingva.

Mario Vetrih

ZAMENHOFTAGO EN KROATIO



La 16-an de decembro kroataj e-istoj solenis Zam-tagon kaj prifestis 60-jariĝon de Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo. Temas sendube pri la plej malnova studenta E-klubo en la mondo. Nuntempe preskaŭ tute ne plu ekzistas sludentaj kluboj kaj tiu kiu kontinue aktivis tiom da jaroj tute ne estas imagebla. El tiu klubo fontis multaj internacie gravaj kroataj esperantistoj: Krešo Barković, Zlatko Tišljar,

Spomenka Štimec, Nikola Rašić sed efektive SEK estis unuan fojon fondita jam en 1929 kaj malfondita de faŝistoj en 1941. El tiu antaŭa SEK venas Ivo Lapenna, Tibor Sekelj kaj Emilija Lapenna. La nuna SEK havas malmultajn membrojn, nur 10, sed malgraŭ ĉio ankaŭ tio estas miraklo. Ni gratulu al la prezidantino Mihaela Cik.

Ĉeestis pli ol 60 esperantistoj el Kroatio en Eŭropa Domo de Zagreb. La programon parte preparis Studentoj de SEK kaj parte Kroatia E-Ligo. Jen la linio, kie vi povas vidi du seriojn da fotoj kaj 5-video-filmetojn: http://www.esperanto.hr/agado_zam_tago.htm

Zlatko Tišljar

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de decembro 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Seán Ó Riain, Mikaelo Bronstein, Halina Komar, Ostoj Kristan, Michela Lipari, Ondo de Esperanto, Svisa Espero, Maria Majerczak, Bert Schuman, Mario Vetrih.

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

